



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI – 9-a de Marto 2020

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Eran Yuval-Vodevoz, Amri Wandel. Protokolo de la pasinta kunsido estas sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

1. Raportoj

Amri raportas pri plia sukcesa rapidkurso por 10-klasanoj en Modiin, kadre de la programo “Nicocot”.

2. Demisio de Asaf Ĥefec el la Estraro (Jehoŝua)

Post la aprobita demisio Asaf mesaĝis (laŭ mia propono en Januaro) al mi sian pretecon iĝi la dua membro de la Kontrol-Komisiono; ni aprobu ĝin dum nia somera Ĝenerala Kunveno.

3. IK-21 (Amri)

La IK okazu almenaŭ por la israelanoj, ĉar estas malpermeso pri la eksterlandanoj. Amri informu la eksterlandanojn kaj trankviligu la lokanojn. Sekve la PK-ekskursoj ne okazos. Ni atentu decidojn de la registaro pri eblaj limigoj. **Voĉdonite por.**

4. Dratverejo (Jehoŝua)

Amos ricevis de la luanto 3,500 ILS kaj ĝiros ilin al konto de ELI. **Amri:** ni strebu al nuligo de la ĉefa ŝuldo pro la luado kaj minacu la lanton per evikcio, se li ne pagos 4,500 ILS monate. **Voĉdonite por.**

5. Reklampropono (Jehoŝua)

S-anino Luiza Carol sendis proponon (alkroĉite) reklami Esperanton en broŝuro en Netania. **Voĉdonite kontraŭ.**

6. Ĉu magazenon por niaj libroj aŭ oficejon? (Jehoŝua)

Pro la nestabila stato de Jinon Meiri, en kies loĝejo en Kirjat-Tivon ni de multaj jaroj magazenigas E-librojn de niaj forpasintoj (same ĉe Doron Modan k.a.), anstataŭ oficejon ni daŭre serĉu en Tel-Aviv alireblan magazenon. **Amri** kontraŭas aĉeton de nura magazeno, sed nur kun oficejo kaj kunvenejo.

7. Israela Esperantisto (Mikaelo)

Numero 169 estas praktike jam preta, enpaĝigita, estas atendataj la lastaj korektoj.

La venonta kunsido: lunde, la 13-a de Aprilo (Paska interfestoj!)

Protokolis: Mikaelo Lineckij